Kristana kongreso en Pollando – Legnica 2021

Oldřich Arnošt Fischer

Kluba prelego por Esperantista Klubo Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la 5-an de oktobro 2021

Spite de kronvirusa pandemio en aŭgusto 2021 povis mia edzino Gabriella Stier kaj mi partopreni en Kristana Kongreso kaj la 70-a kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) en pola urbo Legnica.

Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) estas kristana societo, kiu estis fondita en la jaro 1911.
Celo de KELI estas krei efikajn kontaktojn inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.
Oficiala organo de KELI estas dumonata revuo Dia Regno, kiu estis fondita en la jaro 1908 (ISSN 0167-9554).




Pola urbo Legnica situas en sudokcidenta parto de Pollando, en Malsupra Silezio.

La kongreson aranĝis Silezia Esperanto-Asocio kaj KELI.

Trajno de Malsuprasileziaj Fervojoj.



Ni veturis el Brno trans Ústí nad Orlicí en lastan bohemian fervojan stacion Lichkov.
Tie ni prenis polan trajnon kaj kontinuis en Vroclavo-n.
Bedaŭrinde lokomotivo de pola trajno havis difekton, tial ni pli ol du horojn atendis novan trajnon.
En Vroclavo ni trovis alian trajnon, kiu iris en Legnica-n. Kiam ni en Legnica trovis nian kongresejon, jam estis mallumo.

Porpastra Domo en Legnica.



Nia kongresejo troviĝis en grandega Porpastra Domo en Placo de Johano Paŭlo la 2-a.

En Porpastra Domo en Legnica.



La Porpastra Domo estas grandega. Ĉie estis beleco, pureco kaj ordo.

Kongresa libro.




Ni ricevis zorgeme preparitan Kongresan Libron, kie ni trovis ne nur programon, sed ankaŭ detalajn informojn pri interesaj personoj kaj vidindaĵoj.
En la Kongreso partoprenis 52 esperantistoj. Plimulto el ili devenis el Pollando, kvin el Ĉeĥa Respubliko, kvar el Hungario, tri el Rumanio kaj po unu el Francio kaj Svedio.
Esperantistoj-komencantoj anstataŭ prelegoj lernis esperanton en kurso, kiun gvidis Elżbieta Karczewska.




Kantaro.

Krome la kantaro Adoru ni uzadis la kantaron Lernado per Kantado, kiu enhavas esperantigitajn tekstojn de 74 kantoj. Ofte al ni mankis spertaj muzikistoj.

Temo de la Kongreso




Temo de la kongreso estis ekologia. Ni rememoris la 15-an verson de la 2-a ĉapitro de la libro Genezo: „Kaj Dio la Eternulo prenis la homon kaj enloĝigis lin en la ĝardeno Edena, por ke li prilaboradu ĝin kaj gardu ĝin“.
Ni ne estas en Edeno, sed ĉu planedo Tero similas al la ĝardeno Edena aŭ al ia antaŭinfero, kie eĉ lasta karbo jam forbrulas?

Postcisterciana monaĥa komplekso en Lubiąż.



La 8-an de aŭgusto ni vizitis postcistercianan monaĥejan komplekson en Lubiąż, kie ni aŭskultis koncerton de muzika grupo „Kamerata Autentik“.

Post reveno el ekskurso.




Post reveno el ekskurso atendis nin gastama Porpastra Domo en Legnica, kies unu enirejo estis ornamita per esperanta saluto „Bonvenon!“
Kaj ankaŭ bongusta vespermanĝo.

Teresa Pomorska, ĉefa perantino.



Amuza vespero estis muzika. La programon gvidis kaj komentis Teresa Pomorska.

Muzika vespero. Jerzy Stefański kaj Wojciech Ławnikowicz.



Sian kapablecon kanti kaj ludi muzikajn instrumentojn prezentis Wojciech Ławnikowicz, Jerzy Stefański...

Teresa Pomorska kun muzikistino Inna Stawniczuk el muzika grupo „Kamerata Autentik“.



... Inna Stawniczuk kaj junaj pianistinoj Aleksandra kaj Julia Czajka el Vroclavo.

Świdnica.
Vidaĵo de sur urbodoma turo.




Venonttage ni povis admiri la urbon Świdnica de sur renovigita urbodoma turo (2012), kiu estas 58 m alta kaj havas 10 etaĵojn.

Kirko de Paco en Świdnica.



Trezoro de Świdnica estas Kirko de Paco el la 17-a jarcento, kiu estas la plej granda ligna preĝejo en Eŭropo.

En Kirko de Paco en Świdnica.



Danco en urba teatro.



Polaj samideanoj el Vroclavo ŝatas danci. Tial ili dancis ankaŭ sur scenejo de urba teatro en Jawor.

Urbodomo en Jawor.




Tie ni vizitis urbodomon, ...

Antaŭ fotado.



...antaŭ kiu ni estis fotitaj...

En placo de la urbo Jawor. Gabriella Stier kaj Oldřich A. Fischer.
Fotis Ekaterina Eugenia Popoviciu.



... kaj iomete ripozis.

Spontana danco en fervoja stacidomo de Jawor



Sed danca entuzismo nin ne forlasis eĉ en fervoja stacidomo en Jawor.

Biblia vespero. Bengt Olof kaj André Åradsson, Ágnes Ráczkevy-Eötvös.



Belegan vesperon por ni preparis Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Bengt Olof Åradsson kaj André Åradsson. Tio estis Biblia Vespero. Ni sidis ĉirkaŭ la tablo, sur kiu estis preparitaj kartoj kun bibliaj citatoj. Ni prenis po unu karto, laŭte tralegis la citaton kaj rakontis, kion por ni la citato signifas, kiel ni ĝin komprenas kaj kiel Dio influis nian vivon. Tiu vespero al mi tre plaĉis kaj mi rekomendas ĝin iam ripeti.

Bolesławiec. Pavol Petrík interpretas en fabriko por ceramikaĵoj.



En la urbo Bolesławiec ni trarigardis fabrikon por ceramikaĵoj. Ni aprezis bonegan laboron de Pavol Petrík, kiu bravure interpretis ĉiujn komentariojn de ĉiĉeronoj.

Permana ornamado de ceramikaĵoj.




La fabriko estas unu el la plej grandaj produktantoj de manfaritaj kaj mane ornamitaj tablaj ceramikaĵoj. Sed tiu laboro estas malfacila. Precipe laboro en polvoplena laborejo kaj kun certe venenaj koloriloj estas neenviinda.

Inter ceramikaĵoj.



Inter ceramikaĵoj





Monumento de rusa marŝalo Miĥail Kutuzov (1747 – 1813), kiu en Bolesławiec mortis.

En Bolesławiec havas sian monumenton fama rusa militestro marŝalo Miĥail Illarionoviĉ la princo Goleniŝĉev-Kutuzov-Smolenskij (1747 – 1813). Ni scias lin kiel heroon de militoj kontraŭ Napoleono (ekzemple de batalo apud Aŭsterlico, la 2-an de decebro 1805). En Bolesławiec Kutuzovi malvarmumis kaj mortis de pneŭmonio.

Aleksandra kaj Julia Czajka, talentitaj pianistinoj el Vroclavo.



Vespere ni aŭskultis pianan koncerton de Aleksandra kaj Julia Czajka el Vroclavo.

Kongresa temo estis „...kaj gardu ĝin“ Gen 2, 15.

Bengt Olof Åradsson prelegis pri Greta Thunberg.




El prelegoj al mi tre plaĉis la prelego de Bengt Olof Åradsson pri juna sveda ekologia perantino Greta Thunberg. Li sian prelegon akompanis per fragmentoj de video pri parolado de Greta Thunberg en sveda Parlamento. Homaro jam influis klimaton de tuta planedo. Degelo de glacimontoj, vastaj brulegoj en sudamerikaj praarbaroj kaj siberiaj arbaroj, smogo en urboj, manko de akvo kaj inundoj, elmortado de multaj plantaj kaj bestaj specioj, tio estas sekvoj de sopiro pri riĉigo. Ekonomaj interesoj ofte venkas ekologajn strebojn. Knabino Greta suferas de sindromo de Asperger, tial ŝi parolis klare, sen ordinara muko, kiun ofte en siaj paroladoj uzadas politikistoj.

Grażyna Szubryczyńska prelegas
pri ekologa edukado en infanĝardenoj.




Oni devas homojn ekologe eduki ekde infanaĝo. Grażyna Szubryczyńska prelegis pri ekologia edukado en infanĝardeno.

Ensemblo de popolaj kantoj kaj dancoj LEGNICA.



Ni povis admiri ankaŭ silezian folkloron. Ensemblo de kantoj kaj dancoj „Legnica“ estis fondita en la jaro 1975. En pasintaj jaroj ĝi havis 1 000 koncertojn kaj 40-foje veturis eksterlanden.

Ensemblo de popolaj kantoj kaj dancoj LEGNICA.



Ensemblo de popolaj kantoj kaj dancoj LEGNICA.
Elżbieta Andrusieczko-Tor prezentas orĥestron,
Pavol Petrík interpretas.





Katedralo en Legnica.

Koncerto de Armand Perykietko.





Belega estis koncerto de Armand Perykietko
en la Katedralo de Sanktaj Petro kaj Paŭlo en Legnica.

La 21-an de septembro 2021. Anna Cisło el Vroclavo vizitis Esperantistan Klubon en Brno.



Kontaktoj kun polaj esperantistoj kontinuas. La 21-an de septembro 2021 Anna Cisło, patrino de junaj pianistinoj el Vroclavo, kiu komencis lerni esperanton, vizitis nian Esperantistan Klubon en Brno.

**Kristana Kongreso en Legnica estis bonege aranĝita. Ni dankas al Teresa Pomorska kaj ŝiaj kunlaboratoj por ilia laboro.**

**Venonta Kristana Kongreso kaj la 71-a kongreso de KELI okazos en Hungario (Domaszék, 16-23 julio 2022).**

**La vilaĝo Domaszék situas apud la urbo Szeged, kiu situas 180 km sude de Budapeŝto, proksime de serbia landlimo.**
**La kongresejo estos eduka kaj libertempa domo de Romkatolika Eklezio, kies nomo estas Zöldfás (Verdarba).**

**Rekomendita literaturo**

AŬTORA KOLEKTIVO (1993): Bible. Písmo svaté Starého a Nového zákona (včetně deuterokanonických knih). Ekumenický překlad. 3-a eldono, Český Těšín, Česká biblická společnost, 283 paĝoj. [Biblio. La Malnova kaj Nova Testamentoj kun la Duakanonaj Libroj; ĉeĥe]

AŬTORA KOLEKTIVO (2006): Biblio. La Malnova Testamento tradukita de Ludoviko Lazaro Zamenhof kun la Duakanonaj Libroj tradukitaj de Gerrit Berveling. La Nova Testamento tradukita de la Brita Komitato (John Cyprian Rust, B. John Beveridge, C.G.Wilkinson). 1-a eldono, IKUE kaj KELI, Dobřichovice, Kava-Pech, 1375 paĝoj. [esperantlingve] IKUE & KELI 2001: Adoru, Ekumena Diserva Libro, 1-a eld., Ponto, CIP-Titelaufnahme der Deutsche Bibliothek, 1422 paĝoj. ISBN 3-9803793-5-3.

AŬTORA KOLEKTIVO (2013): Polština. Konverzace se slovníkem a gramatikou. 2-a eld., Brno, Lingea, s. r. o., 320 paĝoj.

COUSSON, P. 2021: La kristanoj, loĝantoj de la planedo Tero. Enkonduka prelego en Legnica, 70-a kongreso de KELI. Dia Regno 4, 75-80.

DĄBROWSKI, D. 2001: Legnica. 1-a eld., Bydgoszcz, Wydawnictwo tekst Spółka z o. o., 80 paĝoj.

FISCHER, O. A. 2019: Miaj rilatoj al Pollando. Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 27-an de februaro 2019. www.literatura.bucek.name/brno//fischer_Miaj%20rilatoj%20al%20Pollando_190227.pdf

FISCHER, O. A. 2021: Biologia plureco – propreco kaj unu el la kondiĉoj de la vivo. Dia Regno 3, 63-66.

FISCHER, O. A. & STIER, G. 2015: Ekumenaj Bibliaj Tagoj kun kantaro Adoru en Vroclavo. Prelego por Esperantista Klubo en Brno, la 13-an de majo 2015. www.literatura.bucek.name/Brno//fischer_vroclav.pdf

FROSSARD, A. 1990: Portrét Jana Pavla II. 1-a eld., Prago, Zvon, 96 paĝoj.

POMORSKA, T., DEMBIEC, B. , GMYREK, R., KAŹMIERCZAK, Z., WACOWSKA, A., TRACZ, E. & WOJTAKOWSKI, E. 2020: Lernado per kantado. Porokazaj kantoj kaj kanzonoj (tekstoj). Edukaj materialoj. 1-a eld., Vroclavo, Silezia Esperanto-Asocio, 72 paĝoj.

POMORSKA, T., WACOWSKA, A., DEMBIEC, B. & TRACZ, E. 2021: Kongresa libro de Kristana Kongreso kaj la 70-a Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia, 1-a eld. Legnica 7 – 14 aŭgusto 2021, 30 paĝoj.